
Turangio Luko
numero 12



4-a trimestro 2008

En tiu numero vi legos..

La Luaraj kasteloj estas famaj sed oni malofte aŭdas pri la kastelo de Tours, D. Baron informas vin...	p.1 p.2
Li ankaŭ rakontas la historion de la unua sanktulino de Usono.	p.2 p.3
En 2006, J-J. Moreau biciklis en Rusujo.	p.3 p.4
Ĉu ĉapelo estas ornamaĵo? J. Gaumé retrovis libreton, kiun li tradukis antaŭ kelkaj jaroj.	p.5
Post Printempo kaj Somero, jen Aŭtuno kaj Vintro, du aliaj poemoj de A. Español estis poeto.	p.6
D. kaj E. Margot partoprenis en Internacia Semajno en Hispanio.	p. 6
Jen kion diris la viro, kiu parolis kun li mem.	p.7
M-F Gaumé proponas spicitan recepton.	p. 8
André Aude rakontas kiel li komplezeme sendis "artaĵojn" al hispana korespondanto.	p.8
J. Turbillon komponis vortludon por vi.	p. 8

La kastelo de Tours


La antikva loĝejo de la grafoj de Turanĝio kadukiĝis : la kvadrata turo Feu Hugon estis starigita en la IX^{a} jarcento de la grafo Hugo de Tours, laŭ la ordono de Karolo la Kalva por plifirmigi la urbajn muregojn kontraŭ la atakoj de la Normandoj. Ĝi situis proksime de la strato Blanqui, sed hodiaŭ ĝi estas tute malaperinta.



La grafoj de Tours konstruigis novan kastelon en la X^{a} jarcento.

Laŭ la turanĝia tradicio, Henriko la Dua Plantaĝeneto, reĝo de Anglujo, iĝinta grafo de Anĵuo kaj Turanĝio, rekonstruigis la kastelon en la jaro 1160^{a}. Dum la lukto inter la familio Plantaĝeneto kaj la franca reĝa familio, la kastelo estis sturme prenita trifoje : en Decembro 1194, en Aŭgusto kaj Septembro 1203 ; Rikardo Leonkoro, Johano sen Tero kaj Filipo Aŭgusto pridisputis la provincon. Finfine en 1204, tiu lasta gajnis kaj Turanĝio iĝis franca.

François de Belleforest (verkisto naskita en 1530 en Sarzan, Gers, mortinta en 1583) asertas en sia *Cosmographie Universelle,* ke la kastelo estis rekonstruita de Filipo la Tria la Maltima (le Hardi), filo de Luizo la Naua . Fakte oni ne scias, ĉu la nunaj restaĵoj datumas de la fino



de la XII^{a} jarcento aŭ de la fino de la XIII^{a} jarcento.

En 1357, oni renovigis ĝin, iĝanta parto de la murego ĉirkaŭanta la urbon.

En 1417, oni forigis la strandon de la riverego Loire : la akvo tuŝis la muregon kaj la du nordajn turojn.

En la reĝa kapelo, ĉe la nord-okcidenta angulo de la fortreso, du edziĝfestoj okazis : la 18^{an} de



La turo de Guise

Decembro 1413, la daŭfeno Karolo (la Sepa) edziĝis kun Maria de Anĵuo ; la 24^{an} de Junio 1436, la daŭfeno Luizo (la Dekunua) edziĝis kun Margareta de Skotlando. Laŭ antikvaj gravuraĵoj, tiu kapelo, norde orientita, estis en la gotika stilo sufiĉe sobra. Laŭ la diroj de Francesco Florio (tiu verkisto naskiĝis en 1420 en Florenco, Italio, kaj loĝis en Tours), Luizo la Dekunua venis kapelen por aŭskulti sanktajn muzikojn de Jean Ockeghem [okegem]. Jean havis belegan voĉon. Li plenumis la oficon de la unua kapelpastro de la reĝa kapelo kaj trezoristo de la preĝejo Sankta Marteno de Tours.

Dum la religiaj militoj, la kalvinanoj de la princo de Conde [konde] okupis la kastelon de la 2^{a} de Aprilo 1562 ĝis la 10^{a} de Julio de la sama jaro. De la komenco de Januaro 1589, la kvina etaĝo de la ĉefturo, komforta, fariĝis la malliberejo de la juna Karolo la Unua, duko de Guise [giz], la unua filo de Henriko la Unua la Strekvundita (le Balafré).

En la venonta numero de Turanĝia **Luko**, *mi rakontos, kiel la duko en 1591 eskapis el la turo, nomita de tiam* ***la turo de Guise***. *Tiu evento finis la grandan historion de la kastelo de Tours*.

Poste, ĝi estis uzita kiel deponejo por armiloj, salpetroj kaj pulvoj kaj kiel militista mallibereJo. Sed oni forgesis fari la urĝajn riparojn, eĉ se temis pri pordoj kaj seruroj ; tial, la 10^{an} de Decembro 1648, 13 germanaj kaj hispanaj oficiroj senpene sin forsavis. En 1780, la malkonstruo de la kastelo estis decidita ; ĝiaj ŝtonoj estis uzitaj por konstrui la kajojn de la Loire.

Nur konserviĝis du turoj, inter kiuj oni starigis en 1798 la pavilonon de Marso.

Dum la XIX^{a} jarcento, rande de la strato Lavoisier kaj de la kajo de Orléans, oni konstruis ĉevalejojn, kaj laŭlonge de la strato Albert Thomas kaj des Maures la nunaj konstruaĵoj aldoniĝis.

La metilernantoj de "Tour de France" restaŭris la kastelon de 1972 ĝis 1978, sub la kontrolo de la « Historiaj Monumentoj ». Du muzeoj eniris ĝin : la akvario kaj la vaksa muzeo Grévin pri la historio de Turanĝio. Nun, ĝi estas ekspoziciejo.

Dominique Baron

◆◆◆◆◆◆◆◆◆◆

La unua sanktulino de Usono

La 7^{an} de Julio 1946, la papo Pio la XII^{a} kanonizis **Françoise-Xavière Cabrini [fransuaz kzavier kabrini]**, italinon, la unuan sanktulinon de Usono.

Ŝi naskiĝis en la jaro 1850 en Lombardio (Italio), dektria infano de riĉa familio de kultivistoj. La sanktulino fariĝis instruistino en 1872, poste estrino de orfejo. Kiam ŝi intencis eniri ordenon, ĉiu kongregacio rifuzis ŝin pro malforta sanstato. Ŝi do decidis, kun 6 amikinoj, starigi sian propran kongregacion en 1880 ; tiel estiĝis la Instituto de la Misiistinoj de la Koro de Jesuo.

Post naŭ jaroj, kiam ŝi volis forveturi en Ĉinion, papo Leono la XIII^{a} petis ŝin, ke ŝi sindonu al la laborado kaj protektado por la italaj elmigrintoj en Usono. Dum tiu laborado, Françoise-Xavière veturis 24 fojojn al Eŭropo, migradis tra la tuta norda Ameriko, starigante lernejojn, hospitalojn, orfejojn kaj kongregaciajn domojn.

En 1914, ŝi fondis en Noisy-Le-Grand (Francio) orfejon por akcepti la infaninojn de la italaj elmi-

grintoj. Tiu orfejo estas nun la liceo Françoise Cabrini.

Nacianigita usone en 1909, ŝi mortis en Chicago [ŝikago] en 1917, 67 jara, post la fondado de 67 institutoj de sia kongregacio en 8 landoj de Usono kaj Eŭropo.

Oni festas ŝin la 22an de Decembro.

Sankt Emma



Vojaĝo en Rusujo

La naŭan de aŭgusto 2006 :

La aviadilo surteriĝas je la dudeka horo. Post kalkaj formalaĵoj, ni atendas, ne..., ni atendadas longtempe la tandemojn; ni povas nek trinki nek manĝi ĉar ni estas en la internacia zono, plue ni ne havas rublojn.

La Rusoj perdis niajn tandemojn, ni koleregas, ni ne scias ĉu ili serĉas ilin. Post longa tempo jam noktmezas. Ni vidas en lifto la tandemojn, kiuj atendas nin. Nun, ekstere de la flughaveno, ni devas atendi la kamionon, kiu transportos niajn tandemojn. Ĝi ne rajtis atendi fronte al la pordo, do ĝi parkadis for. Post kiam la bicikloj estas kargitaj ni denove devas atendi la aŭtobuson. (Ĝi ankaŭ ne rajtis atendi fronte al la pordo). Tuj kiam la aŭtobuso alvenas ni enbusiĝas por trakuri la sep cent kilometrojn al Penza. Nia dormoĉambro troviĝas en grandega sporto-komplekso. Ni havas du litojn, necesejon kaj privatan duŝon. La plafono estas tre alta, la koridoroj kaj la stuparoj larĝaj. Ni havas glaci-ŝrankon, tapiŝon, altan lignan ŝrankon... kaj televidilon.

Post la malkovro de la loko, ni devas iom mekaniki. Dum la vojaĝo, la Rusoj aŭ la Germanoj rompis mian bremson, do mi devas ripari ĝin. Ili ne prizorgis la materialon. Ni vespermanĝas kaj dormas ne sufiĉe, sed dormas.

La dekan de aŭgusto :

Ni vizitas Penza-n. Estas granda urbo. Ĉie malnovaj domoj el ligno, neniam prizorgitaj. Estas truaroj ĉie en ŝoseo, ni devas bicikli dekstren, maldekstren por ne fali. Ĉie la malriĉecon ni trovas. La fraŭlinoj estas blondaj... Tro altaj por mi !

La dekunuan de aŭgusto :

Ni piknikas ĉiujn kune ĉe la bordo de lago, kies nomon mi ne plu memoras. La Rusoj ekbruligas fajron por varmigi la akvon de la teo. La ĉeno de mia tandemo estas rompita. Antaŭ la vojaĝo mi ne vidis, ke ĝi estis rustigita. Mia amiko Vladimiro telefonas al sia amiko, kiu kunportas novan ĉenon por mi. Nun ni ne plu timas pedali forte.

La dekduan de aŭgusto :

Sporta festo. Ni estas akceptitaj sur la ciklodromo. La ministro de la sportoj kaj la instancoj de la urbo faras al ni donacojn kaj donas flagojn, ni faras same.

La urbestro de Penza invitas nin por tagmanĝi kune en sporta loko. Post la manĝo ni denove iras sur malbona vojo, kies ŝoseo estas ornamita de truoj : ni ne povas rigardi la naturon pro tiuj truaregoj.

Ni vespermanĝas kun la organizantoj kaj siaj familioj. Unu biciklantino venis el Ukrainio kun siaj tri infanoj por vidi nin. Ili vojaĝis dum tri tagoj per trajno. Mi donas al ili bildojn presitajn de mi.

La dektrian de aŭgusto :

Ekde la naŭa ni ekiras kune malantaŭ la aŭtomobilo de la policistoj. Ili funkciigas sian sirenon. Ĉiuj Rusoj haltigas sian veturilon, ili estas disciplinitaj. Ni biciklas fiere en la urbon, ni ne plu konas la trafiklumojn. Post dudek kilometroj la policistoj forlasas nin, ni ruliĝas sur ŝoseo mezbona sen tro da truoj.

Ni piknikas apud la bordo de rivereto kaj ni revenas. Ni trakuras cent tridek kilometrojn. La tieaj kampoj estas grandegaj kiel en la regiono

"Beauce" en Francio, pejzaĝo seninteresa. La domoj estas malnovaj, ne bone zorgitaj. En vintro la loĝantoj verŝajne malvarmiĝas.

Mi forgesis... dum la vojiro ni renkontis enterigon. La mortinto estis en ĉerko malfermita, la koverto estis apud ĝi. La veturiloj estis en malbona stato : radiatoro perdis sian akvon. La irantaro estis haltigita.

La dekkvaran de aŭgusto :

Ordinara tago.

La dekkvinan de aŭgusto :

Ni ekiras ekde la naŭa. Ni biciklas ĉiam malantaŭ la policista aŭtomobilo. Tuj kiam ni eliras el la urbo, ni ruliĝas solaj. Ni estos akceptataj de la estrino de la lernejo : "Centre de vélo extrême"*. La tieaj gelernantoj estas junaj (de la sepa ĝis la dektria). La spektaklo ekas. La lernantinoj dancas kune, kun balonoj, ktp. Ili similas "pom-pom-girls". La knabinetoj dancas bele, mi emociiĝas, miaj amikoj ankaŭ. Post tio ni vidas biciklantojn, akrobatemajn malgraŭ sia juna aĝo. Ili supreniras facile sur ŝtonojn, ŝtonegojn, sen fali. Poste super teramasojn, altajn, altegajn, tre altegajn, ili flugas per biciklo kaj turniĝadas longtempe. Nun, jen la motorciklantoj (preskaŭ - istoj !). Ili estas tri : unu el ili estas dekjara, la du aliaj dekdujaraj. Ili ruliĝas rapidege, flugas super la teramasojn, sen timi.

Post la spektaklo la estrino vizitigas sian muzeon. Tie estas la atestoj de la vivo de tiu vilaĝo, de la gravaj personoj kaj de la mortintaj dum la diversaj militoj. Ni estas trinkonta kune teon, sed kiam ni ĉetabliĝas ni malkovras multajn manĝaĵojn por ni. Ni parolas kune kiel ni povas, ĉefe per manoj. La estrino ĉeestas kun sia filino kaj siaj du nepoj (la du motorciklantoj). Ili estas altirataj de niaj tandemoj kaj ne hezitas grimpi sur niajn rajdilojn malantaŭ ni por rondiri en la korto de la lernejo. Ni faras donacojn kaj ni eliras al Penza.

Hodiaŭ estis memorebla tago. Malgraŭ la feriaj tagoj, la infanoj revenis lernejen speciale por kontentigi nin... Ili tre bone sukcesis !

La deksesan de aŭgusto :

Post dudek kilometroj ni piknikas borde de la lago en la vilaĝo "Lopukouka". Dum ties vizito, vilaĝanino invitas min vidi sian domon. Ŝi loĝas kun sia frato. Ili estas maljunaj. Ŝi ploras : tri anoj el sia familio mortis antaŭ nelonge. Por entombigi ilin ŝi devis vendi sian nuran bovinon, do ŝi ne plu havas monon plue sia frato estas drinkemulo.

Post tiu vizito, alia virino ankaŭ invitas nin vidi sian domon. Ŝi estas iom malpli malriĉa ol la alia virino. Ŝi estis inĝeniero, ŝiaj du filinoj lernas la francan, ili ne ĉeetas. Ni invitas tiun virinon pikniki kun ni. La Rusoj ekbrulas fajron por varmigi la akvon de la teo. Hodiaŭ estas bona tago.

Ekde la deksepan de aŭgusto, mi ne plu verkas, mi ŝatus sed mi ne plu havas deziron. Nun mi laciĝas pro la vojo, la vetero, la etoso. Kvankam mi amas bone miajn akompanantojn mi ŝatus reveni hejmen ĉar ĉi-tie la naturo estas malpli bela ol tiu de Kirgizio.

La sekvantajn tagojn ni vizitas la urbon, kiu nomiĝas Vladimir Ninji Novgorod kaj la ĉefurbon Moskvo, kie mi admiras la belegajn monumentojn.

Dum nia restado en Rusio ni estus devinta stampigi nian pasporton sed ni ne sciis tion. Se ni volas reveni hejmen ni devas pagi monpunon (okcent eŭrojn !). Ĉiuj vizitantoj (preskaŭ ĉiuj) antaŭvidas tiun malbonaĵon. Ni ne scias kien iros nia mono. Ĉu en la poŝo de malhonestulo ?

Post tio en la flughaveno, oni devas doni niajn tandemojn al la liftistoj sed ili estas tro lacaj kaj ne volas fari tion. Dum la iro ili perdis niajn tandemojn, hodiaŭ ili estas mallaboremaj, do ni devas enliftigi niajn rajdomaŝinojn ni mem. Ni deziras retrovi la tandemojn en bona stato en Francio.

Antaŭ la enaviadiliĝo la doganistoj zorge kontrolas nin, ili rigardas ĉiujn longatempe : nian kapon, nian pasporton, ktp. Ili malpermesas nin foti, kion ni volas foti. Ĉu ni estas teroristoj ? Tiaj Rusoj ne scias, kion signifas "liberecon", ĉu iam ili scios ? Hejme nun, mi legas en la gazeto "Revuo Esperanto" la titolon "Esperanto iĝas danĝera en Pollando" Ĉu la homoj freneziĝas ? Estas la nuna kialo ! Kion oni povas fari por eviti tion ?

* Ekstrembiciklado Centro

Jean-Jacques Moreau

Sen aŭ kun ĉapelo ? *

esperanto	français	**esperanto**	français
aceto	acide acétique	**aĉeto**	achat
ago	acte, action	**aĝo**	âge
aj!	aïe !	**-aĵ(suf.)**	chose
akcento	accent (tonique)	**akĉento**	accent (parlé)
Altajo	Altaï	**altaĵo**	hauteur
baso	basse (mus.)	**baŝo**	bâche
brigo	brick (mar.)	**briĝo**	bridge (jeu)
brugo	point de Bruges	**Bruĝo**	Bruges
burgo	burg	**burĝo**	bourgeois
buso	autobus	**buŝo**	bouche
caro	tsar	**ĉaro**	char
celo	but	**ĉelo**	cellule
cemento	ciment	**ĉemento**	cément
centono	centième	**ĉentono**	centon (litt.)
ci	tu	**ĉi**	ici
Cicerono	Cicéron	**ĉiĉerono**	guide (une personne)
ciklo	cycle (tous sens)	**ĉiklo**	chicle (pour chewing-gum)
cilio	cil	**Ĉilio**	Chili
cimo	punaise	**ĉimo**	chyme
cipo	cippe (archéologie)	**ĉipo**	blatte
ciro	cirage	**ĉiro**	cirre (botanique)
cit'	radical de citer	**ĉit !**	chut !
digesto	digestion	**diĝesto**	recueil condensé
digita	endigué	**diĝita**	digital
diciplino	discipline	**disĉiplino**	une disciple
dogo	dogue	**doĝo**	doge
ec'	suffixe de qualité	**eĉ**	même
ega	énorme	**eĝa**	se rapporte à l'arête (géométrie)
ehe !	aha !	**eĥe**	en écho
fascini	fasciner	**fasĉini**	revêtir de fascines

*Eltiraĵo de la libreto de Jacques Gaumé "Sen aŭ kun ĉapelo", franca traduko de la libreto de Josef Murĵan "Por kio ĉapelo ?"

Nia forpasinta amiko Artemio Español ŝatis verki versaĵojn, jen du aliaj poemoj el la "Kvar sezonoj", kiujn li sendis al mi en 1992. Li aldonis al la tajpitaj folioj manskribitan komenton : "Jen mi sendas por vi la Kvar sezonoj. La enhavo estas malriĉa kaj ties versoj tute malkongruas kun la realeco ; tamen ili estas tiaj kiaj ili estas, ĉu ? "

Jacques Gaumé

AŬTUNO

Kvankam neniu ĝin vokis, ĵus aperis entrudulo,
Ĝiaj freŝaj matenoj, palaj sunradioj,
Kaj oftaj nebulpluvetoj, jen l'aŭtuno,
El plumba karaktero kaj utopiaj suspiroj.

Kontempli dum kelkaj noktoj la brilan stelaron,
Post vespermanĝo, por digesti, ĉe l'ĝardeno;
Spiradi blovetantan naturan aeron,
Senegala dolĉa revo por pacigi nian menson.

Ankaŭ la luno jam ekhavas palan mienon,
Akompanas ĝin ofte kelkaj nubsplitoj;
Brilantaj larmetoj descendas sur ĝian vizaĝon,
Ĉar spite ĉion, eĉ la lun' tristas pro l'alven' de l'vintro.

Profitu paŝadi kaj admiru ankor' kelkajn tagojn,
La jam flaviĝantan foliar' de l'ĝarden' kaj arbaron;
Baldaŭ ne plu estos suko, kaj ili disfalos,
Kovrante la grundon de dika tavolo.

Jen la granda, blua, profunda, perfida maro;
Ĝi restas sola kun siaj bordoj kaj oraj sabloj,
Kun siaj algoj, ŝarkoj, balenoj kaj eta fiŝaro,
Ĉar pro l'frida vetero jam forkuris l'estaĵoj.

Ni ne forgesu nian viglan junularon,
Kiu post libertempa ripozo denove laboras
En uzinoj aŭ lernejoj, urboj aŭ kamparo,
Kun bonvolo kaj kuraĝo dum multaj long' monatoj.

VINTRO

Malgaja vintra sezono jam komenciĝis,
Tagoj sensunaj, senlumaj, grizigas
La spacon senvivan ; kamparo silentis,
Birdetoj ĉiuspecaj forflugis kaj migris.

Profundajn sulkojn plugas kamparanoj,
Por ke glacio, frostego mortigu l'insektojn;
Fojno en garbejojn, rikolto en grenejojn,
Ĉi veteraĉo pereigas eĉ... bufojn kaj ranojn.

Glacia pluvo inundas la grundon
Miksita kun hajlo kaj neĝoflokoj;
Potenca ŝtormo dissemas teruron,
Fulmotondro eĥiĝas tra la kanjonoj.

Riverojn da ruĝa lafo vomas la vulkanoj,
Ĉion detruante, pereigante la homojn;
Interne de nia globo bolas inferaj kaldronoj;
Ekstere, oceanoj, glacikampoj, penoj kaj malbonoj.

Hejme l'estaĵo ŝirmas sin, hejtas kaj sin distras,
Kaŭritaj apud flamanta kenfajro je familia etoso:
Mallongaj la tagoj, sed noktoj tristaj, senfinaj;
Pro tiu talpa vivo, moliĝas la homa ... medolo.

Sed malgraŭ tiom longa, ĉi vintro baldaŭ finiĝos,
Kaj iom post iom, la tagoj estos pli longaj kaj helaj,
La suno ege brilos, kaj senpene pli frue leviĝos,
La viroj kuraĝe laboros, la virinoj estos ... pli belaj.

A. Español : Julio 1992

Internacia Semajno 4 – 11 octobre 2008

Estis por ni granda plezuro iri en Salou, apud Mediteraneo sur la "Costa Dorada".

Ni estis tre bone akceptitaj de Luiz Serrano Perez.

Ek de la sabato, ni partoprenis en la kurso de esperanto de Sano Aldis Buss, kaj en la interkona vespero kun frandaĵoj, vino, k.t.p.

Ni estis 128. La ĉefaj aranĝoj estis debato sur Homo Sapiens kaj prelegoj pri "kio okazas kun la interna ideo : la verdaj konfliktoj".

Dum la nokto 2 filmoj "La barbero de Seville" kaj" La granda blondulo kun nigra suo".

La etoso estis sufiĉe simpatia. Ni iris Barcelonon per buso, sub la pluvo. Bedaŭrinde ni ne povis promeni tra la stratoj de la urbo. Ni renkontis multajn amikojn. Estis agrable !

Danielle kaj Edmond Margot

☆	ENVOLVOS KAJ LIGOS	☆	SIMBOLO DE AMPERO	UNUA PARTO DE LA KAŜFRAZO	FOR-MORTINTA BOV'	LANTANO KAJ HIDRO-GENO	SUBSTAN-TIVA FINAĴO	☆	SUBITE MONTRIĜI	DUA PARTO DE LA KAŜFRAZO	SUBSTANCO EN URINO	ZOOLOGIA ĜARDENO	BEDAŬRA INTER-JEKCIO
SIMBOLO DE FOSFORO	P	FRIPONO, KANAJLO / ORNAMA ĜARDEN-FLOR'	A	Ĉ	U	L	O	KULPIGO / MALSANO DE GRENO	A	K	U	Z	O
SIMBOLO DE ATMOSFE-RO	A	T	GRUPA, KOLEKTIVA / MARA RABIST'	A	R	A	PIED-SIGNOJ / SUFIKSO (ARTOJ)	S	P	U	R	O	J
BRUNE-RUĜA METAL'	K	U	P	R	REZINO-DONA ARBO / FIL' DE PRIAMO	H	I	M	E	N	E	O	MEZUROS LA PEZON
RESTADEJ' DE HELENAJ DIOJ	O	L	I	M	P	SERIO DA LEĈIONOJ / GEEDZIG-FESTA	K	U	R	S	O	PORTU-GALIO (aŭtosimb.) / KONTRAŬ-UL' EN AMO	P
LOĜANT' DE ARABA RESPUBLI-KO	S	I	R	I	A	N	MONTRA ADJEKTIVO / NOMO DE LA 13-a LITERO	T	I	A	PREFIKSO (DENOVE) / VAZOJ POR VOĈDONI	R	E
☆	HEJMLANDO / MALDOLĈE	P	A	T	R	U	J	O	SENTIS SENSAN PLEZURON / HINDO-ĈINA ŜTATO	Ĝ	U	I	S
LA SESA TONO	A	INTERN-AĴOJ DE BUĈITA BESTO / GLOBA	T	R	I	P	O	IDO DE INSEKTO / UJO POR ĈERPI AKVON	L	A	R	V	O
AŬTOSIM-BOLO DE MAŬRICIO	M	S	EKZIST' / RUSA VIRNOMO	E	S	T	KONFUZE SIMILAS / LOKA KOMITATO	Ŝ	A	J	N	A	S
SURMURA ANONC-PAPER'	A	F	I	Ŝ	EBRIIGA / SUBSTANC' LAŬTLEGI AL SKRIB-ANTO	A	L	K	O	H	O	L	MONATO
ESTRAD' DIREKTAD'	R	E	G	A	D	GUŜOJ / METALA ŠIRMVEST'	K	O	S	O	J	ROMANE 500 / FOTO-GRAFAĴ'	M
SEKSA VOLUPT'	E	R	O	T	I	K	MANĜEBLA FRUKT' / KONKLUDA KON-JONKCIO	P	O	M	FAKA ASOCIO / PREPOZICIO	F	A
☆	TERNIUKSO / SKRIBA PUBLIKA DISKUT'	A	R	A	K	I	D	O	LIRIKAJ POEMOJ / VOLITIVA FINAĴO	O	D	O	J
PAĜO	P	MARA MOLUSKO / FRANCIA ĈEFURBO	O	S	T	R	O	VAZETO / REFREŜIGA BUTIKO	U	J	E	T	O
GRUP' KOLEKTIV'	O	P	DIOTIMA / FAROS LEDON EL FELO	P	I	A	SIMBOLO DE KALIO / NEDIFINA PERS. PRONOMO	K					
RILATA AL LONGA LIGNA TABULETO	L	A	T	A	REFLEKSIVA ADJEKTIVO / PISAĴ'	S	I	A					
FLANKIĜU DE LA VERO	E	R	A	R	U	INDIANA EKKRIO / ASTATENO URANIO	O	F					
MOLA (EN MUZIKO)	M	I	N	O	R	A	LA TRIA TONO / PREZENCA FINAĴO	E					
APARTIG-ITAJ DE ALIAJ	I	Z	O	L	I	T	A	J					
TRIGONO-METRIA FUNKCIO	K	O	S	I	N	U	S	O					



Kvinspica kuko

Por 6 personoj:

- 1 supkulero da cinamo
- 1 kafkulero da koriandro
- 1 kafkulero da zingibro
- 2 kariofiloj
- 1/2 kafkulero da pipro
- 250 g da faruno
- 125 g da butero
- 3 ovoj
- 50 g da raspita ĉokolado
- 125 g da sukero
- 1 saketo da bakpulvoro



✯ Miksu la buteron kun la sukero, aldonu la ovojn unuope, aldonu la kribritan farunon kaj pinĉoprenon da salo, fine aldonu la spicojn kaj la ĉokoladon.

✯ Grasumu kaj farunu la muldilon. Enmetu la kukaĵon.

✯ Baku 45 minutojn en forno, je varmeco 5/6 (175 gradoj)

Rememoroj

De tempo al tempo venas al mi rememoroj, ĵus mi pensis pri faro amuza kaj aŭdaca.

Dum la jaro 1952ª aŭ 53ª mi iris al Hispanio, mi vojaĝis trajne kaj deziris en daŭro de unu semajno viziti Barcelonon, Madridon kaj Sevillon, sed tiam en tiu lando la fervojo malregule funkciis. Ekzemple por havi la eblecon iri al Sevillo, necesis ke mi dividu mian restadon en Madrido ĉar ne ĉiutage trajno ligis ambaŭ urbojn, do mi restis en la ĉefurbo ĵaŭdon kaj dimanĉon;

En Barcelono pere de korespondanto mi konatiĝis kun du aliaj samideanoj. Unu el ili, post pluraj leterinterŝanĝoj petis ĉu mi povus sendi al li revuon kun bildoj de nudaj virinoj, laŭ li pro artisma intereso li tion bezonis. Ne gravis al mi ĉu li tion deziris pro arto aŭ vira plezuro. Mi sciis ke sub la rigida regado de Franco [franko] kaj de la eklezio, prezento de fotoj de nudaj virinoj estis severe malpermesata en tiu lando.

Kiel fari ? Estis simpatia persono, mi volis kontentigi lin, do mi sendis al li plurajn el tiuj revuoj en ... kovertoj de la "Espero Katolika". La afero sukcesis, li ĉion ricevis !

André Aude

Juanita proponas alian literludon.

✪ Irante de supre malsupren, aldonu unu literon por formi vorton je ĉiu etaĝo.

✪ Oni povas ŝanĝi la ordon de la literoj.

De NI al ... JONKVILO

N	**I**						
•	**N**	**I**					
I	**N**	•	•				
•	**I**	**N**	•	•			
I	**N**	•	•	•	•		
•	•	**N**	•	•	•	**I**	
J	**O**	**N**	**K**	**V**	**I**	**L**	**O**

De VI al ... KOVRILOJ

V	**I**						
I	**V**	•					
V	•	•	**I**				
•	•	**I**	**V**	•			
V	**I**	•	•	•	•		
•	•	**V**	**I**	•	•	•	
K	**O**	**V**	**R**	**I**	**L**	**O**	**J**

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr